WIKIPEDIA

Islanda lingvo

La **islanda lingvo** (*íslenska* [Islenska], antaŭ 1974 *íslenzka*) estas nordĝermana lingvo. Ĝi estas la oficiala lingvo en Islando. Ĝi estas parolata de proksimume 300 000 homoj, ĉefe de la enloĝantoj de Islando, sed ankaŭ de kelkaj usonanoj havantaj islandajn praulojn.

Vortoj kun islanda origino en Esperanto inkluidas:

- gejsero el fama islanda specimeno *Geysir*
- sagao

Islanda lingvo	
íslenska	
Parolantoj	prosimume 300 000
Skribo	latina alfabeto (islanda alfabeto)
Lingvistika klasifiko	
Hindeŭropaj lingvoj	
Ĝermanaj lingvoj	
Nordĝermanaj lingvoj	
Islanda	
Oficiala statuso	
Reguligita de	Árni Magnússon Institute for Icelandic Studies
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	is
ISO 639-2	
Bibliografia	ice
Terminologia	isl
ISO 639-3	isl
Glottolog	icel1247
Angla nomo	Icelandic
Franca nomo	islandais

Enhavo

Lingva klasifiko
Specialaĵo
Skribo
Historio
Specimenoj
La Patro Nia
Vidu ankaŭ
Eksteraj ligiloj

Lingva klasifiko

La islanda lingvo devenas rekte de la norena lingvo de la vikingoj, kaj tiom malmulte pluevoluis, ke multaj eĉ konsideras tiujn du unu sama lingvo. Ĝia plej proksima parenco estas la feroa lingvo, iom pli fore la norvega (*nynorsk*).

Specialaĵo

Parte pro la fiereco de la islandanoj pri sia kulturo, parte pro la iom fora situo de la insulo, la islanda lingvo dum pluraj jarcentoj ne spertis gravajn ŝanĝojn. Dum la aliaj skandinavaj lingvoj dum sia longa historio forĵetis la plej multajn gramatikajn specialaĵojn, la islanda gardis ilin ĝisdetale.

Krom tio la islandanoj klopodas eviti la transprenon de fremdlingvaj neologismoj. Novajn terminojn ili formas kutime el jam ekzistantaj islandaj vortoj. Tiel ekzemple la vorto *tölva* (komputilo) formiĝis el *tala* (nombro) kaj *völva* (magiistino). La vorto *alnæmi* (aidozo) estis formita el la eroj *al* (ĉio) kaj *næmi* (sensiveco), ktp.

La lernado de la islanda lingvo pro tio fariĝas sufiĉe komplika. Tamen ĝi povas esti inda, ĉar: kiu regas la nuntempan islandan lingvon, tiu eĉ pli-malpli kapablas legi la antikvajn islandajn sagaojn.

Skribo

La islanda lingvo estas skribata per varianto de la latina alfabeto, kun du konsonantaj kromsignoj *þ*, *ð* (interdenta *s*, *z*, IFA-a [ð, θ], *þ* venas el runoj) kaj vokalaj signoj *æ*, *ö*.

La islanda alfabeto tiel konsistas el 32 literoj:

Majuskloj																															
A	Á	B	D	Đ	E	É	F	G	H	I	Í	J	K	L	M	N	O	Ó	P	R	S	T	U	Ú	V	X	Y	Ý	Þ	Æ	Ö
Minuskloj																															
a	á	b	d	ð	e	é	f	g	h	i	í	j	k	l	m	n	o	ó	p	r	s	t	u	ú	v	x	y	ý	þ	æ	ö

Historio

La nuna islanda alfabeto estis kreita surbaze de la normo formiĝinta en la 19-a jarcento. La precipa kunkreinto estas la dana lingvisto Rasmus Rask.

Fine de la 20-a jarcento la alfabeto estis ŝanĝita. Oni anstataŭis la kombinon *je* per la litero *é*. En 1974 estis abolita la litero *z*.

Islanda klavarfasono

Specimenoj

La Patro Nia

Faðir vor, þú sem er á himnum.
Helgist þitt nafn, til komi þitt ríki,
verði þinn vilji, svo á jörðu sem á himni.
Gef oss í dag vort daglegt brauð.
Fyrirgef oss vorar skuldir,
svo sem vér og fyrirgefum
vorum skuldunautum.
Og eigi leið þú oss í freistni,
heldur frelsa oss frá illu.
Því að þitt er ríkið, mátturinn og dýrðin
að eilífu amen.

Vidu ankaŭ

- Ŝanĝoj inter la malnovnordlanda kaj islanda lingvoj
- Tago de la islanda lingvo
- Islanda literaturo
- Alta-Islanda lingvo
- Listo de lingvoj

Eksteraj ligiloj

- Íslenska, í senn forn og ný (http://bella.mrn.stjr.is/utgafur/islenska.pdf) (islande)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Islanda_lingvo&oldid=6319437"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 19:11, 15 maj. 2018.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.